



Estis farita interkonsento kun medicina sekcio de ĈES pri estonta kunlaboro. La nova sekcio eldonos regulan ĉiumonatan cirkuleron, kiun sendos al interesuloj la sekretario de la sekcio Josef Vaněček, Na Libuši 630, 39165, Bechyně. Li ankaŭ gvidas pliperfektigan korespondan kurson. (senpage).

La invalido. Longa serio da fakaj kuracistaj ekzamenoj. Poste kelke da semajnoj de nervoza atentado. La presita invitilo al kuracista ekspertizkomisiono. La duontagon kun la komisiono kaj la definitiva decido – la invalido. Matene, kiam la homoj iras al la laborejo, li estas staranta ĉe la fenestro kun malplenaj manoj. Post la dekkvara horo ili revenas. Ili amike interparolas. Li gvatas ilin trans la kurteno, havante nenion por diri. Li travivis ok malplenajn horojn meze de kvar muroj. La tagoj kaj la semajnoj pasantaj unu kiel alia. Li ekkomprenis, ke li estas starinta sur alia bordo. La subdistrikta kuracisto ĉiam pli ofte kaj insiste paroladas pri memrealiĝo – la vorto, kiu nenion diras al li. Fine li ekkomprenas ĝin, nesciante, kiel pleniĝi ĝia per ago. Hazarde li ekmemoris, ke en junaĝo li intencis lerni ian internacian lingvon. Li elserĉis la malnovan lernolibron. Li komencis. La enkonduko estis parolanta pri la facileco de la lingvo. Li progresadis malrapide. La vortojn kaj gramatikajn regulojn, kvankam sen esceptoj, li devis lerni. Kaj li ja ne plu estis juna. - Denove hazardo. Li komencis vizitadi lokan rondeton. Li trovis novajn amikojn, kiuj helpis al li lerni la lingvon. Post unu jaro li jam skribis unuan leteron eksterlanden. Li ne esperis. Tamen la respondo venis. Sin sekve li gajnis pluajn amikojn. Li jam havis eblecon paroli kun iu pri io. Esperantistoj estas pacdefendantoj. Li dediĉis tutan sian elanon al tiu ĉi movado. Li jam ne estis staranta sur alia bordo, senkonsila kaj suferanta. Li estis troviĝanta meze de la aktivado. Li mem partoprenis ĝin. Kontenta pro eblo de memapliko, li bonfartis. Multaj el in ĉi maniere komencis, certe multaj el vi simile komenco. Ni volas faciligi vian decidon

Byla učiněna dohoda se zdravotnickou sekcí ĈES o budoucí spolupráci. Nová sekce bude pravidelně vydávat cirkulář měsíčně, který zájemcům zašle sekretář sekce Josef Vaněček, Na Libuši 630, 39165 Bechyně. Vede také zdokonalovací kurzy písemnou formou (bezplatně).

Invalida. Dlouhá řada odborných lékařských vyšetření. Pak několik týdnů nervosního očekávání. Předtištěná pozvánka k lékařské posudkové komisi. Půlden s komisí. Konečné rozhodnutí – invalida. Ráno, kdy chodí lidé do práce. Stojí u okna s prázdnýma rukama. Po čtrnácté hodině se vrací. Družně rozmlouvají. Pozoruje je za záclonou, nemá co říci. Prožil prázdných osm hodin uprostřed čtyř stěn. Jdou dny, týdny. Jeden jako druhý. Pochopil, že stanul na druhém břehu. Obvodní lékař stále častěji a naléhavěji mluví o seberealizaci. Slovo, které mu nic neříká. Posléze je pochopí. Neví, jak je naplnit činem. Náhodně si vzpomněl, že se v mládí chtěl učit nějakému mezinárodnímu jazyku. Vyhledal starou učebnici. Začal. Úvod hovořil o snadnosti jazyka. Postupoval pomalu. Slovíčka i mluvnická pravidla i když pravidelná a bez výjimek se musil naučit a nebyl už mlád. Opět náhoda. Začal navštěvovat místní kroužek. Našel nové přátele. Pomohli mu v učení jazyka. Za rok napsal první dopis do zahraničí. Nedoufal. Odpověď přece přišla. Postupně získával další přátele. Měl již s kým a o čem hovořit. Esperantisté jsou obránci míru. Věnoval celý svůj elán tomuto hnutí. Nestál již na druhém břehu, bezradný a trpící. Byl uprostřed dění. Sám se na něm podílel. Uspokojen možností uplatnění, cítil se zdrav. Mnozí z nás takto začínali. Jistě mnozí z vás podobně začnou. Chceme však usnadnit Vaše rozhodnutí.

Ĉe ĈEA ni organizas sekciojn de esperantistoj-invalidoj. Ni intencas senpere kunlabori kun Asocio de Invalidoj (SI). Ni scias, ke ne ĉiu kaj ne ĉie ni havas eblon viziti la lokan E-grupon. La poŝtsendaĵoj estas ja liverataj ĝis la plej malproksimaj kaj flanke situataj kamparaj solejoj. Ni preparas perleterajn bazojn kaj pliperfektigajn kursojn. Ni pripensas renkontiĝojn semajnofine kaj en la daŭro de unu semajno kun instruado de Esperanto. Ni kunlaboros kun Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj (IAHE). Helpe de unu sola lingvo – Esperanto – vi povas korespondi kun homoj tutmonde, akiri novajn amikojn, propagandi nian patrujon. Vi eblas labori en E-porpaca movado por tutmonda disvastigo de porpaca ideo kaj de amikeco inter popoloj. Kunlaboru en sekcio de Esperantistoj-invalidoj. Ne hezitu – skribu al adreso: Josef Vaněček, Na Libuši 630, 39165 Bechyně, vi ricevos pluajn informojn pri la sekcio de Esperantistoj-invalidoj kaj pri Esperanto. Skribu tuj, ankoraŭ hodiaŭ! Miloš Zelinka

Při Českém esperantském svazu budujeme sekci tělesně a zdravotně postižených esperantistů. Hodláme úzce spolupracovat se Svazem invalidů. Víme, že ne všude a ne každý má možnost navštěvovat místní skupinu. Pošta je však doručována i do nejdlejších samot. Připravujeme korespondenční základní i zdokonalovací kurzy. Uvažujeme o setkání o víkendu i celotýdenním s výukou esperanta. Budeme spolupracovat s mezinárodní organizací invalidních esperantistů (IAHE). Jediným jazykem můžeme korespondovat s celým světem. Získat nové přátele. Propagovat naši vlast. V esperantském mírovém hnutí máte možnost pracovat pro celosvětové šíření myšlenky míru a přátelství mezi národy. Spolupracujeme v sekci esperantistů-invalidů. Neváhejte. Napište na adresu Josef Vaněček, Na Libuši 630, 39165 Bechyně, obdržíte další informace o osvojení si mezinárodního jazyka i o nové sekci tělesně a zdravotně postižených esperantistů při ČES. Napište ještě dnes. Miloš Zelinka

Kion ni devas fari? El la prelego de Anthony Mercieca, Malto

...Ni, esperantistoj, havas grandan laboron antaŭ ni. Ni devas konvinki (přesvědčit) la homaron (lidstvo), ke ĝi bezonas internacian lingvon. Nur tiam ĝi estos unu granda familio. Ni devas unue konvinki nin mem, ke nia laboro estas serioza kaj utila por la homaro. Kiel oni devas konvinki malriĉulon, ke li devas manĝi, trinki kaj vivi. Tial ni ankaŭ devas konvinki la gravulojn (důležité) de la mondo, ke analfabetismo malaperos por ĉiam el la mondo, kiam oni komencos instrui Esperanton, la facilan kaj utilan internacian lingvon. Intertempe ni devas senĉese (nepřetržitě) informi la aliajn, ke internacia lingvo ekzistas. Ni devas perdi tempon konvinkanta tiujn, kiuj ne volas esti konvinkitaj. Uzu la tempo por instrui tiujn, kiuj volas lerni ĝin.

Ni devas aĉeti librojn en Esperanto. Alie (jinak): kial ni lernis la lingvon? Ĉu por impresi konatulojn, ke ni scias alian lingvon? Memoru, ke eldonistoj volonte eldonas novajn librojn, kiam ili scias, ke la nombro de la legantoj estas sufiĉe granda. Ni devas aboni revuojn en internacia lingvo. Neniu ŝatas presi revuojn kaj librojn por vidi ilin dum multaj jaroj sur bretoj (prknech) en la eldonejo. Kun esperantistoj ni devas paroli esperante. Alie, kial ni lernis ĝin? Oni ne lernas ion ajn (cokoliv), por ke oni ne uzu ĝin. Multfoje en esperantaj renkontiĝoj oni trovas, ke multaj senĉese babilas nacilingve, kvankam ili bone scias la internacian lingvon.

Tia situacio ne plaĉas al tiuj, kiuj volas babili esperantlingve. Oni daŭre inventas dekojn kaj dekojn da metodoj por instrui tiel facilan lingvon. Oni perdas multajn horojn filozofante pri la plej taŭga metodo. Ekzistas nur unu metodo. Por instrui la internacian lingvon oni devas paroli internacilingve. Eĉ la prahomoj instruis siajn lingvojn kiam ili parolis en ili al la gefiloj.

Kiam „mortis“ la latina lingvo? Kiam la homoj ne parolis plu ĝin, sed pri ĝi. Por mi la mortiganto de la latina lingvo estis la instruisto, kiu instruis ĝin al mi. Mi senĉese parolis pri la latina lingvo, sed neniam en ĝi. Li eĉ asertis, ke tiu lingvo ne estas taŭga por la hodiaŭa mondo ... Nun la latina estas mortinta lingvo .... Se ni volas mortigi Esperanton, la plej rekta vojo estas tiu, sur kiu la instruisto de la latina ĉiutage marŝis. Senĉese (nepřetržitě) parolu pri Esperanto, sed neniam en Esperanto. Kiam ni, esperantistoj parolas inter ni en kiu ajn alia lingvo krom Esperanto, ni estas murdistoj de la internacia lingvo. Homoj, kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton, pravas, se ili diras post kiam ili aŭdas nin parolante inter ni nacilingve: „Eĉ la esperantistoj ne bezonas la internacian lingvon!“ Ververe (vpravdě) ne nur ni bezonas unu tutmondan lingvon sed ĉiu el la kvar miliardoj da teranoj. Ni devas vivigi la internacian lingvon. Al alilandanoj ni devas skribi en Esperanto. Ni devas diri al la edukaj instancoj, por ke la gestudentoj lernu la internacian lingvon en lernejoj. Vesperaj kursoj – kvankam utilaj (užitečné) ne sufiĉas por disvastigi Esperanton tra la tuta mondo. La registraroj devas certigi la gestudentojn, ke oni utilas la diplomojn en Esperanto por trovi laboron aŭ iri al uiversitato. Ni devas skribi al radiostacioj, por ke ili uzu la internacian lingvon, kiam ili elsendas programojn por la tuta mondo. Ni devas ankaŭ skribi al tiuj radiostacioj, kiuj jam elsendas en Esperanto, dankante ilin pro la utila laboro, kiun ili faras por la disvastigo de la internacia lingvo. Ni devas skribi al la pluamikoj (=leteramikoj) kaj plumamikoj en la tuta mondo. La esperantistoj devas komuniki inter si. Ni devas kuraĝigi aliajn agi same. Jes ni devas fari ĉion. Neniu alia faros ĝin anstataŭ ni. Feliĉe la vojo estas klara, kvankam laborplena (pracná). Ni laboru, ĉar ni jam scias, ke ĝi estas ĉiam fruktodona. Finfine (nakonec) kiam etulo (malíčký, dítě) aŭ etulino demandos nin “Kial mi devas lerni la internacian lingvon?“, ni ĝoje (radostně) kaj sincere (upřímně) respondos: „Ĉar la tuta mondo uzas ĝin.“

Sendis s-ano Fr.Pleskot, Heřmanův Městec 567

Julio Baghy: I v a ĉ j o.

Ivaĉjo estis brava kampoknabo  
naiva filo de vilaĝa rond'.  
En liaj bluokuloj mankis zorgonubo,  
nenion sciis li pri la granda mond'.  
La vivon miris li kun pia timo,  
kantadis gaje dum la kamplabor' -  
kaj sur la pajla lito al patrino  
biblion legadis dum vespera hor'.

Sed venis tempo mondon detruanta,  
kanonoj blekis, buŝo de l' milit'  
kaj lin forrabis tiu buŝ' giganta ....  
Tri orfoj restis – kampo, pajla lit'.  
Sed li memoris kun kutimo pio,  
pri la lastaj vortoj de l' patrin' al filo:  
„Ivaĉjo kara, diras la biblio:  
armiluzanto mortas per armil“.



La batalkampoj al li miron vekis ...  
Ne grano kreskis tie, sed grenad'  
ne birdoj pepis, sed ŝrapneloj blekis,  
ne gaja kanto sonis, sed vead'.  
Kaj ne plugilon, sed pafilon premis  
la fortaj manoj, spasma kun furor'. x/  
Ivaĉjo miris kaj elkore ĝemis:  
„Ne de dio estas tiu ĉi labor' ...

Li ĵetis for pafilon, bajoneton,  
kaj senarmile staris en arme' -  
kaj senarmile ŝturmis dratoreton -  
kaj senarmile servis en tranĉe'. x/  
Kaj venis puno kaj ordon de l' stabo -  
la kapon ĉiam nee skuis li.  
Obstine diris la vilaĝa knabo:  
„Mi konas nur la dek leĝojn de Di“ ...

Perfido ... mortverdiktis lin juĝisto  
kaj kvin soldatoj tuj fortrenis lin.  
Dum lasta marŝo pensis li pri Kristo,  
pri la biblia, dia disciplin' ...  
Ŝtonkoraj kamaradoj ..., pastro mankis -  
kaj ĉirpis kampa gril' tra l' morta mut' ...  
Ivaĉjo preĝis dion, psalme dankis,  
mildkore iris li al ekzekut' ...

Dum ŝargis la soldatoj. - Li  
subite ekpalpis ŝarĝon de la panosak' -  
en ĝi postrestis pano netuŝite,  
patrinfarita pan', el hejma bak';  
Li prenis ĝin, karesis kun kompatoj,  
eklarmis ... Kiel peze en la man'.  
Ivaĉjo ĝin etendis al soldatoj:  
„Akceptu, frato, estu via pan' ...

x/ spasme = křečovitě, konvulsie

x/ furoro = granda ekscito

x/ tranĉeo = zákop, fosaĵo.

Verkis Julio Baghy je rememoro al la unua mondmilito. (Sendis M.Josková)

Amerikanoj kun kunligitaj langoj Reprezentanto de la ŝtato Illinois en amerika kongreso Paul Simon, kiu jam de longe okupiĝas pri lingvaj problemoj, dediĉis nun sian atenton al la stato de fremdlingva scio de amerikanoj. Siajn esplorojn li kompilis en la libro kun nomo: „Amerikano kun kunligita lingvo“. Kaj la konkludoj estas malgajaj kaj mirindaj. Tuj en la enkonduko la Kongresano-lingvisto skribas: „Nuntempe ni multe pli deziras imponi al la mondo per nia perfekteco en armilado, atombomboj kaj rakedoj ol per nia scio de fremdaj kulturoj en nia ne tro granda planedo. Por la unua ni bezonas nur monon. Tiu dua kontraŭe postulas konojn, modeston al la aliaj kaj bezonon lerni fremdajn lingvojn.“ La lingvoscio, emfazas P. Simon, povas tre helpi al interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la nacioj en la hodiaŭa maltrankvila mondo.

El la menciita libro rezultas la atesto de P. Simon pri totala ignoro de amerikanoj al fremdaj lingvoj. Oni mencias ekzemple, ke en usono estas multe pli da studentoj lernantaj la rusan ol en sovetunio lektoroj instruantaj la anglan. Kiel politikisto mencias Simon ofte ekzemplojn el diplomatio aŭ internacia merkato. Tio estas areoj, en kiuj la amerikanoj ne tro sukcesas.

Li rememoras ekzemple, en la plej krizaj momentoj de irana revolucio nur du dungintoj de la amerika ambasadejo en Teherano iom sciis la lingvon „farsi“. Eblas, skribas Simon, ke ĝuste pro tio ni sciis tiom malmulte pri la karaktero de la tien revolucio kaj ĝiaj sekvoj por ni.

Mankoj de la lingvosciroj de amerikaj diplomatoj gvidas ofte al humuraj situacioj. Ekzemple la anglan vortturniĝon „fiŝtrunko“ tradukis la interpretisto de amerika merkata ambasadejo en la francan kiel „la trunko de sinjoro Fischer“.

P.Simon citas multajn ekzemplojn de lingva ignorado kaj fine li bedaŭras, ke la ŝtata departemento nuligis ĉe diplomataj laborantoj ekzamenojn pri scio de fremdaj lingvoj kun argumento, ke „la angla estas jam sufiĉe populara en la mondo.“ Kaj samtempe li pravas, ke la ignorado de fremdaj lingvoj alportis jam al amerikanoj multajn perdojn, ekzemple en la merkato. Antaŭ ĉio kulpigas Simon amerikan lernejsistemon pro subtaksado de lingvosciroj. Li rememorigas, ke pro la disvastigita ŝovinisma opinio pri ĝenerala disvastigo de la angla lingvo malleviĝis la nombro de la studentoj pri fremda filologio dum lastaj dek jaroj je 44 procentoj. „Nur unu procento da studentoj lernas la lingvojn, per kiuj interkompreniĝas triono de la homaro, nome ĉine, ruse kaj japane,“ konstatas Simon. Krom malbonan lernejan sistemon kulpigas la amerika kongresano ankaŭ specialaĵojn de la amerika socio. La loĝantoj de Usono estas pliparte imigrantoj, kiuj -laŭ Simon- estas sub granda premo de la angla kiel sola lingvo de la amerika unio.

(Lidová demokracie)

#### La plej juna aŭtoro de la vortaro.

La aŭtoron de la signifa verko ne devas ornami per argento trafloranta hararo kaj grandaj lenskadroj de okulvitroj. Tion pravas la kazo de studento Jan Filip, kiu kiel naŭjara knabo finstudis la internacian lingvon – Esperanton. Kiam li konstatis, ke ni ne havas detalan esperanto-ĉeĥan vortaron, li eklaboris je verko, dum kiu helpis al li lia naŭjara frato. Tiam li estis 13-jara. La laboro daŭris tri jarojn, presado du jarojn. Kiam en la jaro 1930 aperis „La granda vortaro esperanto-ĉeĥa“, solenis Jan Filip sian okdekjariĝon kaj lia frato Karlo estis dekkvajara. Ambaŭ knaboj pli poste dediĉis sin al la pedagogia agado kaj ilia vortaro ĝisatendnis en la jaro 1948 sian duan eldonon. (Haló sobota, 8.I.1983).

#### Plua esperanta libro en Sovetunio.

Estona eldonejo Eesti Raamat eldonos en la kvara jaronkvarono de tj. En eldonkvanto 10000 ekzempleroj novelojn de la estona klasikulo Friedebert Tuglas sub titolo „Kvin noveloj“. Anoncas tion la oficiala sovetia buletino „novije knigy SSSR“. Dum la mendo en la vendejoj de la soveta literaturo menciuj la mendonumeron: NK 83-43/323. La libro kostas 40 kopejkojn.

#### Nejmladší autor slovníku.

Autora významného díla nemusí zdobit stříbrem prokvetlý vlas, velké obroučky brýlí. Dokazuje to případ studenta Jana Filipa, který se jako devítiletý chlapec naučil mezinárodnímu jazyku Esperanto. Když viděl, že nemáme podrobný esperantsko-český slovník, rozhodl se, že jej sestaví. Ve 13 letech se pustil do práce, v níž mu pomáhal jeho devítiletý bratr Karel. Práce trvala tři roky, vytištění další dva roky. Když roku 1930 vyšel „Velký slovník esperantsko-český“, slavil Jan Filip své osmnácté narozeniny a jeho bratru Karlovi bylo čtrnáct let. Oba chlapci se později věnovali pedagogické činnosti a jejich slovník se dočkal v roce 1948 svého druhého vydání. (Haló sobota, 8.I.83)

#### Další esperantská kniha v SSSR.

Estonské nakladatelství Eesti Raamat vydá ve 4.čtvrtletí t.r. nákladem 10 tisíc výtisků novely estonského klasika Friedeberta Tuglase pod názvem „Kvin noveloj“. Oznamuje to oficiální sovětský bulletin „Novyje knigi SSSR“. Při objednávce v prodejnách sovětské literatury uveďte objednávací číslo: NK 83-43/323. Kniha stojí 40 kopejek.

„La fostokirkoj en Norvegujo“, okpaĝa publikaĵo pri mezepokaj lignaj preĝejoj en Norvegujo, kaptos intereson ne nur de fakulo pri popola arkitekturo. Interesuloj povas senpage mendi ĝin ĉe: Norvega Esperantista Ligo, Olav Schousv.18, Oslo 5, Norvegio.

„La fostokirkoj en Norvegujo“, osmistránková publikace o středověkých dřevěných kostelících, zaujme nejen odborníka na lidové stavby. Zájemci mohou ji bezplatně objednat na adrese: Norvega Esperantista Ligo, Olav Schousv.18, Oslo 5, Norvegio.

### KIEL DIRI? LenTaigne. Praktika esperanta frazeologio. Daŭrigo.

Arbo – LIGNO. Dehaki branĉon de arbo. Dehaki kverkon. Dehakitaj arboj. Unu hako arbaro ne faligas. Dishaki kverkon, ŝtipon en splitojn. Haki brullignon sur bloko (špalek). Ligno estas bona brula materialo. Prefere mi hakus lignon ol ... Bloko el ligno. Kructavolita ligno. Plaki mahagon sur popla tabulo. Nodoplena tabulo. Vermotrua ligno (červavé). Segi. Raboti (hoblovat). Torni (soustruhovat). Turbi (obrábět). Ne el ĉiu ligno oni faras violonon.

Arbaro densa, nepenetrebla, neekspluatebla. Arboporta ĉarego. *Firsto*. Forstisto. Forstadministracio. *Refortumi*. Reĉepi (fortranĉi arbeton ĝis malmultaj centimetroj super la tero). Arbarizi, arbarumi la nudajn montojn.

Koniferoj: pingloarb.Pino, Piceo. Cedro. Abio (jedle). Strobilo =konuso=ŝiŝka. Lariko (modřín). Cipreso. Taksuso (tis). Kverko (glano=žalud). Fago. Poplo. Platano. Tremolo (osika). Betulo. Mahagono. Akacio. Branĉeto de akacio estas unu el la framasonaj (zednářský) emblemoj. „Abio vi, Abio vi, kun foliar` daŭrema“ (oh Tannenbaum ...)

ARMEO: Kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo. Armeo forta, konstanta profesia, volontula. Ter-, aer-, mar-armeo. Teraj, maraj, aeraj fortoj. Militfloto. Aerofloto. Servi sian patrujon. Devigo de militservo. *Angimsposto*. Rekruti. Konskripcio (odvody). Konskripto (branec). Rekrutekzameno. *Kazerno*. *Militista disciplino*. *Soldati*. Esti sub la armiloj. Aktiva militservo. Rezervisto. *Kazerno*. *Militista disciplino*. *Soldati*. Komandoj: Marŝ! Halt! Front`! Dekstren! Antaŭen! Al kunen! Po ses en vicojn! La ordonoj estas plenumitaj. Apelo. Soldato en forpermeso. Pikedo (družstvo, vojenská hlídka). Saluti per kunmeto de la kalkanoj. Kunklaki la kalkanumojn. Saluti milite. Teni la manojn laŭlonge de la kruroj. Marŝi po du en vico. Laŭkolumne. Laŭvice, takte. Defili parade: tamburo kadencis la marŝon de la trupo. Anserpaŝo. Sentinelo (=gardostaranto). Gardostara budo de soldato. Preni sian gardon. Garde deĵori. Ekzerci soldatojn. Pafi senkugle. Malstifti (odjistit) grenadon. Fusilo (puška): ĉano (kohoutek), kolbo, bajoneto. Rako (stojan). Fusilo, kiu trafas ĝuste. Mitralo (kulomet). Mitraleto (samopal). Surŝultrigi fusilon. Traŝultrre. Balteo (řemen pušky). Kanono: afusto (=subtenilo), faŭko (hrdlo), tubo. Efika trafdistanco de kanono. Kalkuli la trajektorion (dráha střely) de obuso (dělový granát). Kalibro. Rangoj: espotelo (nárameník). Oficiro, suboficiro, generalísimo, marŝalo, brigada, divizia, korpusa generalo. Kolonelo (komandanto de regimento). Majoro (komandanto de bataliono), kapitano (komandanto de kompanio). Leŭtenanto, vicleŭtenanto, subleŭtenanto. Plotono (rota). Serĝento. Kaporalo. Bona kaporalo revas esti generalo, rajtas esti ambicia. Admiralitato. Admiralo. Eskadro. Fregat-, kovert-, *veselkapitano*. Komandanto de torpedŝipo, destrojero (torpédoborec). Perdi siajn galonojn (prýmky). Degradi oficiron. Promocii iun leŭtenanto - Artilerio: *alpeza* (leĝere), peza, longtrafa, kontraŭaviadila, atoma, surŝipa, fortikaĵo, montara surreka, sieĝa. Infanteri(an)o. Tiraljoro (střelec). La fremdula legio. Resti garnizone en urbo. Bivaki (stanovat).



